







№ 03
1968

G.L. GHELLI

ITALIA

Organo
Associazione
Italiana
Ferrovieri
Esperantisti

ferroviista



SOLENA INAŬGURO DE 39--a ITALA KONGRESO DE ESPERANTO
KAJ IV--a RENKONTIĜO DE EŬROPA ESPERANTISTA JUNULARO

=====000000000000=====

En Montecatini Terme, urbo kies famaj estas la sanigaj akvoj, okazis ĉijare, dum la Paskaj festoj, la 39--a Nacia Kongreso de Esperanto kaj la 4--a Renkontiĝo de Eŭropa Esperantista Junularo. Matene, en la preĝejo de Sankta Maria Assunta, katolika kaj protestanta pastroj kuncelebris Ekumenan Diservon antaŭ multaj gesamideanoj kiu sekvis ĝin respektoplenaj kaj kantis en Esperanto kaj ritmike recitis "Patro Nia".

En la salono de "Kursaal" je la 10--a kaj duono, okazis la solena malfermo, antaŭ multnombraj aŭtoritatuloj, ĉu ŝtataj, ĉu urbaj, ĉu esperantaj; inter ili: Senatano Hon.Braccesi, reprezentanto de Itala Registaro, Deputito Hon.Bianchi, S-ro Ballandi de la Turisma Entrepreno de Pistoia, D-ro Bruschetti por la Kurac-Entrepreno de Montecatini, la Vicprovincestro de Pistoia: D-ro Pedoni kaj la Urbestro de Montecatini, kaj aliaj.

D-ro Stoppoloni, prezidanto de I.E.F. salutis kaj dankis la ŝtatajn aŭtoritatojn, la reprezentantojn de la urbaj instancoj, la laboreman LKK--n kaj ĉiujn partoprenantojn. Prof-ro Landucci salutis la Kongreson je la nomo de la urbo kaj provinco Pistoja, aŭspiciante ne nur la sukceson de nia kongreso, sed precipe la venkon de nia idealo por paco kaj frateco.

Aparte menciinda la parolado de la urbestro kiu, esperantlingve, salutis kaj proponis starigon de tradicia renkontiĝo, ĉiujare, en Montecatini; sekvis la respondo de Geom.Ballandi kiu prezidas la Turisman Entreprenon. Li petis pardonon pro sia uzado de itala lingvo, pro kio li kulpigas la vivon inter militoj. "Vi laboras, li diris, favore al la paco pro tio la Entrepreno tre volonte helpis vin, kunlabore kun la Komunumo. Nia aliĝo estis spontanea, ĉar ni ĉiuj estas konvinkitaj ke Esperanto fariĝos lingvo de la estonto. Ni deziras okazigi aliajn esperantajn renkontojn en la bela toskana tero, kiu iam donis al Italujo novan dolĉan idiomon."

Dum kelka ripoza minuto oni legas telegramojn kaj aliajn leterojn: Kardinalo Florit, Ministro Mariotti, Hon. Nicolazzi, Franceschini, Racchetti kaj Vedovato. Mallongaj paroladetoj kaj salutoj, sekvis poste, fare de reprezentantoj aliajn landojn: Anglio, Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio, Francio, Germanio, Jugoslavio, Nederlando, Pollando, Svislando kaj Venezuelo, montris la taŭgecon de internacia lingvo por fratiĝi kun la tuta mondo.

Festparolado de la plej alta aŭtoritatulo, Senatano Braccesi, fermis la solenaĵon, portante la saluton de la Parlamentoj, itala kaj eŭropa, Li varme esprimis sian solidaran senton. -Ni scias ke la mondo bezonas pacon, kaj feliĉe ni antaŭvidas ke paco estas proksima. La granduloj laboras por starigi pacon en la mondo; kaj ni vere esperas ke poste venos ankaŭ la solidareco inter la popoloj, la helpo al subevoluintaj nacioj, kaj fine (kune kun la rasa egaleco) fariĝu nova mondo, nova vivo helpata de lingvo komuna. Tro da luktoj ni vidis inter nacioj, tro da mortintoj ni ploris, tro da perfortoĵoj pro manko de interkompreno. La junuloj bezonas novan vivsistemon, bezonas trovi pli da harmonio inter la pasinteco kaj la nuntempa situacio, kaj ili emas kunigi lian vivon al vivo de ĉiuj popoloj. Tio oni povos realigi nur per tiu lingvo, kiu tradukas facile ĉiujn ideojn, kiuj esprimas la plej delikatajn nuancojn de la sento, kiu povas regi la mondon en paco.-

AMUZAJ PROGRAMOJ

Densa programo de amuzaĵoj, distraj vesperoj, kaj ekskursoj riĉigis nian 39--an Kongreson. Ĉiutage ni veturis per aŭtobuso, al Pescia, Collodi, Pisa, Cutigliano kaj Firenze, kie ni estis gastoj de la loka Turisma Instanco en la nova Palaco de la Kongresoj.

La Sanktan Vendredon, vespere, ni kolektiĝis en la kongresejo, kie en Esperanto, niaj gejunuloj prezentis majstre, la vivon de Jezuo kaj precipe la epizodojn de la Pasio kaj la Kristan mesaĝon al la homoj.

GIUSEPPINA GAMBERINI

JARA KUNVENO DE ITALA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO "I.F.E.A."

En la salono de la kuraca kaj restadeja entrepreno kaj en la kadro de la 39-a Itala Kongreso de Esperanto en Montecatini, okazis vendredon la 12-an de aprilo 1968-a, la 18-a Jara Kunveno de Itala Fervoĵista Esperanto-Asocio "I.F.E.A.". Ĉeestis la kolegoj Ladislav Fiala el Ĉeĥoslovakio kaj Giovanni Sasselli el Svislando.

La sekretario Gimelli tralegis la plej gravajn punktojn de la raporto de la sekretario, redaktoro de la bulteno kaj komitatano de I.F.E.F., kiuj estis jam dissenditaj al la membroj dum januaro.

Menciindaj inter tiuj punktoj estas la enkonduko de la esperanto-teksto en la ĝeneralajn avertojn en la Oficialaj kaj ĝeneralaj horaroj de la Itala Ŝtataj Fervojoj. Aliaj okazintaĵoj menciitaj, estis la starigo de lokaj Fervoĵistaj E-Grupoj en Porretta Terme (Bologna) kaj Vicenza.

Rilate al la elekto de la nova estraro, S-ro Menabene el Romo proponis la konfirmon de la ĝis nuna estraro kaj konsilantaro. La ĉeestantoj aprobis. La rekonfirmita estraro konsistas el: Prezidanto: Prof. D-ro Ing. Bernardino LATTANZI di Monterubiaglio, Romo. Vicprezidanto: D-ro Ing. Giordano AZZI, Como. Sekretario: p.i. Germano GIMELLI, Bologna. Vicsekretario: D-ro Antonio DE SALVO, Romo. Kasisto: S-ro Giulio Catena, Bologna. Konsilantoj: Rag. Aldo FORMAGGIO, Torino, p.i. Agostino RIGHI kaj Dino Lanzoni, Bologna, kaj Claudio PIVARI, Porretta Terme (Bologna). Komitatano de I.F.E.F.: p.i. Germano GIMELLI. Reprezentanto de IFEA ĉe la nacia Konsilantaro de I.E.F.: Rag. Aldo FORMAGGIO.

La sekretario raportis pri la interrilatoj kun la "Association Européenne des Cheminot" kaj la "Europa interamikiĝo de Staciestroj", por pli viglaj kontaktoj kaj kunlaboradoj. Laste li donis informojn pri la vojaĝo al Varna okaze de la 20-a Jubilea I.F.E.F.-Kongreso kaj pri la traduko esperantlingve de faldfolio pri Bologna, fare de Provinca Turisma Entrepreno de Bologna.

Oni sendis telegramon al Hon. Scalfaro, Ministro pri transportoj kaj Civila Aviado por danki por enkonduko de Esperanto en la Italian Fervoĵan Horaron.

GERMANO GIMELLI

STRATO TITOLITA AL GRAVA ESPERANTISTO

En la ĉarna vinloko BISAMBERG, proksime de Vieno 16 kilometroj, sur la strato al Praha, okaze de la 90-a naskiĝtago de Kortega Konsilanto Hugo STEINER estis inaŭgurata: "HOFRAT HUGO STEINER - GASSE".

Ni kiuj trinkis la bonegan vinon de tiu loko en la elverŝejoj de "ĉijara vino", kune kun Samideano Steiner, profitas la okazon por sendi al li la plej korajn gratulojn kaj bondezirojn en la nomo ankaŭ de Itala Fervoĵista Esperanto-Asocio "I.F.E.A.".

53-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

MADRID, 3-10 aŭgusto 1968-a

ALTA PROTEKTANTO: Ĉef-Generalo Francisko Franco, Ŝtatestro de Hispanujo.

ARTA FESTIVALO: En la kadro de la Arta Festivalo okazos teatraj prezentaĵoj fare de Internacia Arta Teatro kaj Bulgara Esperanto-Teatro. Okazos ankaŭ muzikaj prezentaĵoj kun la partopreno de artistoj el pluraj landoj kaj konata hispana kantĥoro "Coral Zaragoza".

I.S.U.: En la kadro de la Internacia Somera Universitato prelegos: Prof. Bokarev, Amb. Harry, Prof. Lapenna, Muzik. Lesznai, Prof. Peevski, Prof. Regulo Perez, D-ro Tonkin, Prof. Waringhien.

FOTO-KONKURSO: La 1-a de julio estas la limdato por sendo de la konkursaĵoj. Kiel temon oni elektu kiun ajn ĉitaĵon el la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj.

Ejoj: La Inaŭguro de la 53-a U.K. okazos en la kovrita sporta stadiono, la teatraj prezentaĵoj en Teatro Zarzuela, la Balo en la ĝardeno Vistillas kaj la Bankedo en Hotelo Plaza.

La Konstanta Kongresa Sekretario

XX-a JUBILEA I.F.E.F.-KONGRESO

Post longa, longa vojaĝo tra Jugoslavio, kun halto en ĝia belega ĉefurbo, ni fine atingis la stacidomon de Sofio, kie nin atendis multaj gesamideanoj preti doni ĉian helpon por faciligi al ni la restadon en urbo kaj lando kies, ne nur lingvo sed ankaŭ alfabeto neniu el ni, itala grupeto, konas. Bonsance nia komuna lingvo estis taŭga interkomprenilo, kaj tuj ni interplektis kun niaj gastoj salutojn, komplimentojn kaj diskutojn pri ĉiaj temoj. En tute speciala, karakteriza restoracio, aŭskultante folklorajn kantojn, ni gustumis bonegajn, tipajn bulgarajn manĝaĵojn. La sekvantan tagon ni vizitis la urbon, kaj impresis nin la belegaj parkoj kaj ĝardenoj dissemataj tra la urbo. Mi pensis al urboj de nia bela Patrujo, riĉaj je ĉarmo kaj historio, tamen preskaŭ sen arboj, sen verdaj pulmoj kaj kvazaŭ enviis ties enloĝantoj.

La alveno en Varna, nia 20-a kongresurbo, kie ni estis akceptataj de multaj gesamideanoj en ĝojiga humoro, surprizis tiujn, de nia grupo, kiuj la unuan fojon vizitis internacian kongreson. Tiu surprizo, tre agrabla certe, kreskis dum la interkona vespero kaj la sekvantaj tagoj.

En tute alia atmosfero okazis, dimanĉon la 12-an de majo, la solena inaŭguro de la Jubilea Kongreso en la Popola Teatro de Varna. Regis severa, serioza, emocia etoso: multaj vizaĝoj estis palaj, multaj aspektis kortuŝitaj kiam ni aŭdis nian himnon, kantata de la kantaĵoro de la Ŝipkonstrua uzino "Georgi Dimitrov" kaj kiam la Prezidanto de L.K.K. s-ro Dolapĉiev deklaris la kongreson malfermita. La ĉeestanta Ministro de Transportoj Marin Vaĉkov, bondeziris al la kongreso fruktodonan laboron, kaj al la gastoj feliĉan restadon en la sunriĉa Bulgarujo. Salutis la kongreson multaj aŭtoritatuloj, kaj grupo da junaj gepioniroj donis al la landaj reprezentantoj kaj al la estroj de nia Federacio, bukedojn da ruĝaj rozoj. Sekvis, kiel kutime, la salutoj de la reprezentantoj de la landaj fervojistaj Asocioj. Fine parolis s-ro De Jong Prezidanto de IFEF, kiu dankis la Ministrarkaj la aŭtoritatojn pro ilia ĉeesto kaj helpo kaj esprimis sian ĝojon esti en tiu bela, suna lando.

La saman vesperon, per ŝipoj ni promenadis tra la Golfo de Varna, kaj ĝuis ravan, fabelan vidindaĵon: mil lumoj, laŭlonge la marbordo, ekbrilis inter la arboj; la ŝipoj, unu post la alia, en la Golfo mem, eklumis sub ĉielo plenplena da steloj, kun luno granda, flavruĝa, vere taŭga por geamantoj: kaj efektive niaj gejunuloj aktive okupiĝis pri tio.

La 13-an de majo okazis tre gravaj kunvenoj: la kunsido de la Fakprelega Komisiono; la kunsido de la Terminara Komisiono al kiu partoprenis nur la fakuloj kaj la plenkunsido kun la elekto de la nova estraro. Vespere en la Teatro de la Kulturdomo de la transportaj laboristoj, efektiviĝis folkloro vespero al kiu partoprenis amatoraj folkloraj trupoj kaj individuaj ludantoj, ĉiuj tondre aplaŭdataj ĉu pro la belegaj riĉaj kostumoj, ĉu pro la muziko kaj la kanto sed precipe pro la pasiaj dancoj.

La 14-an de majo inĝ. Simeon Simeonov prelegis pri "Elektra kaj dizela trakcio en la Bulgaraj Ŝtataj fervojoj". La ĉeestantoj tre aktive sekvis la paroladon kaj la filmojn kaj starigis demandojn al kiuj tre afable kaj volonte respondis la preleganto mem. La saman vesperon en la salonoj de Hotelo "Havana" la urbestro de Varna akceptis la kongresanojn kaj regalis ilin per lukse kaj abunda bankedo. Muziko kaj dancoj tre plezurigis ĉiujn ĝis malfrue.

La 15-an, tuttaga ekskurso al urbo Nesebâr kaj al enfluo de rivero Kamĉija en Nigra Maro.

La 16-an, en saloneto de Hotelo "Rodina" okazis alia kunsido de IFEF-estraro. En la sama tago inĝ. Georgi Ĉernev prelegis pri tiu ĉi temo: "Vagonkonstruado en Popola Respubliko Bulgario, novaj ŝarĝvagonoj kaj ilia elprovo". La prelego, dum kiu estis projekciata filmo, vekis grandan intereson ĉe multnombraj kongresanoj.

Vespere en la Urba Teatro de Varna, la Bulgara Esperanta Teatro prezentis la komedion "Akridoj" satiran bildon de la vivsistemo en la unuaj jaroj de nia jarcento. La aktoroj ludis bonege, kaj longe estis aplaudataj de la ĉeestantoj.

Duontaga ekskurso al urbo Balĉik ĉu aŭtobuse, ĉu ŝipe, logis la partoprenantojn, la 17-an de majo. Tiu ĉi estis la lasta tago de nia kongreso, kaj kiam, je la 15-a, mi eniris en la kongresejon por la fermo, la mienoj malgajaj evidentigis la baldaŭan disiĝon.

La salono estis plenplena, kaj kiam la Eks-Prezidanto s-ro De Jong transdonis signallanternon kun verda lumo, al nova Prezidanto S-ro Giesner kun multaj deziroj pri progreso kaj sukceso en nia Movado, multaj estis emociitaj. Kisoj, ĉirkaŭbrakoj, larmoj kaj ekkrioj igis poste, kvaŭzaŭ freneza, la atmosferon en la salono kaj en la apuda subĉiela halo: sed plej ofte mi aŭdis la kutiman saluton: ĝis venontjare! Jes, karaj gemikoj, ĝis la revido venontjare en Avignon!

DELVINA GIMELLI

=====
N I L E G I S
=====

EN "IL TOURING" Bulteno de Turismaj Informoj de T.C.I. (Itala Turisma Klubo) - Interesa letero de Prof. Bardini el Mantova, prezentas la lingvan problemon en la turisma kaj asertas ke Esperanto estas la sola taŭga solvo al tiu grava problemo.

EN "VOCI DELLA ROTAIA" Monata revuo de Italaj Ŝtataj Fervojoj, letero de S-ro Giovanni Rolando el Genova, sugestas al Ĝenerala Direkcio de F.S., la neceson ke en la Informaj Oficejoj de la ĉefaj kaj landlimaj Italaj stacioj, estu fervojistoj kiuj konas la internacian lingvon esperanton. S-ro Rolando substrekas ke fervojistoj kapablaj paroli Esperanton jam ekzistas kaj necesas uzi ilin en la stacidomoj.

"MONDO DOMANI" Semajna ilustrita revuo pri politiko, informoj kaj aktualaĵoj, kiu simpatie konsideras la Esperantan movadon. En la n-ro 19-a de la 12-a de majo 1968-a tiu revuo dediĉis longan artikolon al 39-a Itala Nacia Kongreso de Esperanto okazinta en Montecatini kaj antaŭe, en la n-roj 15-a kaj 16-a, en la rubriko "leteroj al la Direktoro", jam traktis la esperantlingvan problemon. Tiu ĉi interesa rotogravura revuo, estas aĉetebla ĉe la ĵurnalvendejoj kaj per abono al favora prezo de 5000 italaj liroj po jaro, oni sinturnu al: Mondo Domani, Via Livenza, 7 ROMA.

"LA LINGUA AUSILIARIA INTERNAZIONALE ESPERANTO" Lingvo vivanta en Mondaj Kulturaj Rilatoj. Tre interesa gazeto kiu traktas la problemojn de pacaj rilatoj inter la homoj de malsama lingvo, sendepende de raso, nacieco, religio kaj politikaj ideoj. Nature en unua vico la gazeto parolas pri la lingva problemo kun specialaj rilatoj al Esperanto. Senpage ricevebla ĉe la Direktoro Corrado Cerri, Casella Postale 159 = I-13051 BIELLA-Vercelli.

"LA LINGUA INTERNAZIONALE" Itallingva libreto kiu enhavas la tradukon kaj resumon de la originala Esperanta verko de Prof. D-ro Ivo Lapenna. La aŭtoro esperas ke la legantoj ricevu novan fidon pri la gravaj valoroj de Esperanto kaj pli profundan konvinkon rilate al estonto de la Internacia Lingvo Esperanto. La verko eldonita de la Esperanto-Grupo de Trento je zorgo de Itala Esperanto-Federacio, enhavas la portreton de la aŭtoro: Prezidanto de la Universala Esperanto-Asocio, Membro de Akademio de E. kaj Direktoro de la Centro de Eksploro kaj dokumentado, krom tiu de nia Majstro D-ro L.L. Zamenhof.

"LA SKOLTA MONDO" - Oficiala Organo de la Skolta Esperantista Ligo - Fondita en 1918-a. Interesa revuo kiu festas en sia lasta numero la oran jubileon, nome la 50-an datrevenon de S.E.L. - Petu informojn ĉe Itala Sekcio de Skolta Esperantista Ligo, ĉe Prof. Cav. Franco Tulone, Via Frangipane, 8 I-92019 SCIACCA (Agrigento) Italio.

LA FOIRO DE PADOVA okaze de sia 46-a Ĉiujara Internacia Fojro (31-a de majo - 13-a de junio 1968-a), eldonis luksan dukoloran faldfolion kun fotoj; ĝi enhavas esperantlingvajjn klarigojn pri siaj komercaj grupoj kaj pri la kongresoj kaj kunvenoj. La faldfolio enhavas ankaŭ mallongan historion

kaj turismajn informojn pri la Urbo kaj Fojro. Rimarkinde sur la lasta paĝo: oni povas legi mallongan reklamon pri uzado de Esperanto en la komerca kaj industria medio. Esperantlingva Eldono-Corso Vittorio Emanuele, 6 PADOVA (Italio).

5-a INTERNACIA PEDAGOGA ESPERANTO-SEMINARIO en Szeged (Hungario) 10-20 de aŭgusto 1968-a. En tiu ĉi jaro jam la kvinan fojon oni aranĝos Internacian Esperanto-Seminarion en Szeged, por pligrandigi la lingvajn, movadhistoriajn, literaturajn kaj metodikajn konojn de la partoprenantoj. La nombro de la partoprenantoj kutime estas 300-400 el 10-15 landoj. Vörösmarti u.7 SZEGED (Hungario).

BONVENON EN DISTRIKTO LIPTOV - Vizitu urbon LIPTOVSKY' MIKULÁŠ - Tre bela esperantlingva prospekto kun koloraj fotoj kiu bonege substrekas la turismajn allogaĵojn de tiu Ĉeĥoslovaka regiono taŭga por someraj kaj vintraj restadoj. Akompanas la luksan prospekton, kartoneta faldfolio kun indiko de la diversaj skiejoj de la montarĉeno Malaltaj Tatroj, kaj de la vojsignaliloj por la aŭtomobilistoj. Ambaŭ senpage riceveblaj ĉe Distrikto de Vojaĝtrafiko Ĉedok, aŭ Esperanto-rondeto ĉe Muzeo de Janko Král-LIPTOVSKY MIKULÁŠ - Ĉeĥoslovakio (Ĉ.S.S.R.)

NIMES - LA FRANCA ROMO - Arta urbo. Belega faldfolio kun koloraj fotoj kaj aparta esperanta aldonita faldfolio kiu reklamas la turismajn allogaĵojn de Nimes, turisma centro por la Gardo kaj regionoj: Provenco kaj Langdok. La faldfolio klarigis la belaĵojn de tiuj regionoj ĉu naturaj ĉu historiaj ĉu monumentaj. Senpage ricevebla de: Syndicat d'initiative de Nimes et du Gard. Boulevard de prague, 30 NIMES (Francio).

SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO - 16-23 Junio 1968-a PLZEŇ (Ĉeĥoslovakio) - Uzina klubo ROH SKODA Esperanto-Rondo, invitas kore la esperantistojn veni en Plzeň, urbon de riĉa Esperanto-tradicio, dum la 1-a semajno de internacia amikeco, okazonta en junio 1968-a. Esperantistoj! Vizitu Ĉeĥoslovakion, gastaman landon riĉan je famaj historiaĵoj! Vizitu okcidentan Bohemion, regionon de famaj banlokoj kaj de la mondfamaj industrio kaj biero! Vizitu urbon Pilzeň naskiĝurbo de Ĉeĥa preso, de la famaj Ŝkoda-uzinoj, de la mondfama biero Prazdroj!

UNIVERSALA DEKLARACIO DE HOMAJ RAJTOJ - Ĝus aperis la kvara eldono de la Universala Deklaracio de H.R., en la Internacia Lingvo Esperanto, eldonita de Universala Esperanto-Asocio (en konsultaj rilatoj kun UNESKO). La broŝureto enhavas konsiderojn pri la Universala Deklaracio de Prof.D-ro Ivo Lapenna, la antaŭkonsiderojn kaj la artikolojn de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj akceptita kaj proklamita de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj la 10-an de decembro 1948-a. La U.E.A. intencas distribui la novan eldonon dum la Jaro de Homaj Rajtoj 1968, por kiu la mondorganizaĵo preparis specialan agad-planon. Ĝi enfazas precipe la Artikolon 2, laŭ kiu "Ĉiuj rajtoj kaj liberecoj...validas same por ĉiuj homoj, sen kia ajn diferencigo...laŭ lingvo...". Universala Esperanto-Asocio argumentas, ke nur neŭtrala internacia lingvo povas garantii la defendon de tiuj homaj rajtoj, kiuj dependas de la lingvo.

PRESKRIBO POR FELIĈO - Esperantlingva libreto eldonita de Tensho Kotai Jingu Kyi. Tabuse, Yamaguchi, Japanio, pri la instruoj de "OGAMISAMA", la celo de kiu estas la purigado de via animo, por ke vi povu trovi la Regnon de Dio sur la tero, interne de vi, kiel Kristo ankaŭ instruis. Se vi vivas juste vi trovos pacon en via koro, en la familio kaj tial efektivigos pacon en la Mondo.

NEKROLOGOJ

= La 21-an de marto subita korkolapso falĉis la vivon de unu el la plejkonataj esperantistoj: D-ro Wilhelm HERMANN, estinta Prezidanto de Germana Esperanto-Asocio kaj estrarano de U.E.A. Li naskiĝis en 1901 en Neustadt kaj esperantiĝis en 1920. Ke Li repozu en paco! Multajn kondolencojn al liaj gefamilianoj kaj al Germana Esperanto-Asocio.

= Abrupte atingis nin la kortuŝa sciigo pri la subita morto, en Bologna, de S-ino Annunziata BAGNULO, edzino de nia elstara pioniro: Lia Moŝto Adv. Raffaele Bagnulo, Honora membro de I.F.E.A. Nia Asocio partoprenas al Lia granda doloro kaj sendas sincerajn kondolencojn.

54-a UNIVERSALA KONGRESO EN HELSINKI

Urho KEKKONEN, prezidanto de Finnlando, akceptis la Altan Protektantecon de la 54-a U.K. de Esperanto, okazonta venontjare en Helsinko.

La ĵus formita 18-membra Loka Kongresa Komitato (prezidanto estas Mag. N.G.Narvala, vicprezidanto de Esperanto-Asocio en Finnlando, Prezidanto de Finnlandaj Fervojistoj-Esperantistoj kaj Komitatano de I.F.E.F.) jam rezervis kiel kongresejon la Teknikan Altlernejon kaj la apudan domon de ĝia studenta korporacio. La Altlernejo estas unu el la plej rimarkindaj kreaĵoj de la moderna finna arkitekturo. Oni decidis aranĝi postkongresan ekskurson al Leningrad.

INTERNACIA MEDITERANEA FOIRO EN PALERMO

Pere de la klopodoj de la nova Esperanto-Grupo "Trinakria" de Palermo (Via Dante, 71), la instancoj de la loka "Internacia Mediteranea Foiro" metis je nia dispono, tiun ĉi jaron, grandan budon por permesi al ni propagandi, inter la vizitantoj de la Foiro mem, nian aferon.

Ni aranĝis grandan ekspozicion de libroj, turismaj faldprospektoj, revuoj en Esperanto ktp. kaj organizis, en tiu ĉi okazo, korespondan kurson de Esperanto.

La Direkcio de la Foiro montris sian grandan intereson por la lingvo E. kiel ili por la Internacia Propagando de la Foiro mem.

ESPERANTO-GRUPO "TRINAKRIA"

G E E D Z I Ĝ O

La Vicsekretario de Itala Fervojista Esperanto-Asocio S-ro Antonio DE SALVO kaj f-ino Adriana PAPA geedziĝis la 27-an de Aprilo en la Baziliko Sankta Johano ĉe Latina Pordego en Romo.

La nova feliĉa paro loĝas nun, sub la signo de la verda stelo en Via Saturnia, 49 int.12 - I-00183 ROMA (Italio)

Nia Asocio elkore gratulas kaj bondeziras!

NOVA DIREKTORO DE LA CENTRA OFICEJO DE U.E.A.

Sekve de la rezigno de F-ino M.Vermaas de sia posteno, la Estraro de U.E.A. elektis D-ron Victor Sadler kiel Direktoron de la Centra Oficejo en Rotterdam. D-ro Sadler, al kiu ni kore bondeziras, estis antaŭe redaktoro de "ESPERANTO": en pasinta aŭgusto li estis elektita vicdirektoro de la Centra Oficejo.

ESPERANTO ĈE ITALA PARLAMENTO

Je la fino de januaro, la 5-a Komisiono por ŝtata budĝeto esprimis favoran sintenon pri la unua elspezo de 10 milionoj da italaj liroj por la instruado de esperanto. La 7-an de marto 1968-a, la 8-a Komisiono pri publika instruado definitive aprobis leĝ-proponon 1816 kun nur unu sindeteno.

La leĝo, tuj transdonita al Senato, ne povis esti ekzamenata antaŭ la 10-a de marto, kiam la parlamentaj laboroj fermiĝis. Tial, post la parlamentaj elektoj de majo ĉijara, la leĝprojekto devos rekomenci sian vojon kaj denove esti pritraktata de la du Komisionoj en la Ĉambro de Deputitoj kaj en la Senato, kaj poste definitive aprobita de la du Ĉambroj en pleno.

Kvankan nia sukceso estis nur parta, tamen unuafoje, en la historio de nia movado, la problemoj de Internacia Lingvo estis serioze priksiderata de la superaj instancoj de itala Parlamento. Tiu atingo kronas la laboron faritan de la itala esperantistaro dum la lastaj tri jaroj.

ESPERANTO EN LA RADIO

RADIO ROMA-ESPERANTO-Casella Postale 320 I-00100 ROMA. La dissendoj okazas de h.21 ĝis 21,20 (MET). Ondlongoj: metroj 25,40; 30,90 kaj 41,24. Ĉiudimanche. La unua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al diversaj temoj, la dua parto al "Kuriero de Esperanto".